

Prof. M. Saponjić (Beograd, Jugoslavio)

FINE APERIS PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO (PIV).

Cefa aŭtoro Profesoro GASTON WARINGHIEN, Prezidanto de la Akademio de Esperanto. Eldonanto: S A T, 67 avenue Gambetta, Paris-20. 1344 paĝoj inkluzive Enkondukajn paĝojn, Tabelojn kaj Bildoplatojn. Formato 148 x 210 mm. — Prezo, inkluzive sendkostojn: US dol. 26,10 — Pagoj (en Francujo) al poŝtkonto 9535.36 Paris je nomo de SAT — Paris, (alilande) ĉu rekte al poŝtkonto 20 049 Zürich — kun plena adreso de SAT-Paris, ĉu tra kutimaj revendistoj. Havebla ĉe SAT ekde oktobro.

Jam ĉe la unua ekrigardo al la PLENA ILUSTRITA VORTARO ĉiu esperantisto devas senti fieron ĉar ni nun en Esperanto havas tiom imponan-verkegon. Sed kiam mi trafolumis ĝin, nur supraĵe rigardinte la enhavon, mi vidis ke ĝi ne estas nur laŭ sia aspekto impona verko, sed laŭ sia enhavo ĝi meritas eĉ pli da komplimentoj.

Mi revenis al la unua kovrilpaĝo. La verko estas fortike tuttole bindita en tre bela verdkolora tolbindaĵo. Sur la unuaj paĝoj estas listo de la kunlaborantoj de PIV. El ĝi oni tuj povas vidi kiom serioza estas ĉi tiu verko. En la listo ni povas legi inter aliaj la nomojn: G. Waringhien, P. Neergaard, L. Bannier, St. Kamaryt, I. Lapenna, K. Kalocsay, E. Urban, G. Canuto, A. Albault, L. Bastien, M. C. Bulter, L. Laurat, J. Baghy, J. Régulo-Perez, C. Stöp-Bowitz, R. Haferkorn, V. Setälä, A. Venture ktp. El tiuj pluraj estas kompilintoj de fakaj terminaroj, kio estas tre grava ĉar ili multe pliriĝigis la vortprovizon de PIV per fakaj esprimoj.

La ĉefa diferenco inter la malnova PLENA VORTARO DE ESPERANTO kun SUPLEMENTO (PV) kaj la ĵus aperinta PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO estas dudirekta, nome kvanta kaj kvalita.

Se ni parolas pri kvanto ni povas diri ke PIV estas proksimume trioble pli ampleksa ol PV. Tio kompreneble ne signifas ke en ĝi estas trifoje pli da vortoj kompare kun la malnova PV. La pliriĝigo estas multe pli grava.

Nome la klarigoj kaj ekzemploj (precipe Zamenhofaj) estas pli multnombraj ol tio estis en PV. Nun pluraj nocioj ne sufiĉe bone komprenitaj en PV estas bonege klarigitaj kaj per taŭgaj ekzemploj demonstritaj.

Krome grava pliriĉigo estas en fakaj kaj sciencaj esprimoj kiuj plejparte mankis en la malnova PV. M. faris provojn serĉinte en PIV plurajn fakajn kaj sciencajn esprimojn (trovatajn en opaj fakterminaroj el kiuj pluraj jam delonge ne estas troveblaj en merkato) kaj mi trovis en ĝi preskaŭ ĉiujn. Multaj el la menciitaj kunlaborantoj mem verkis jam publikigitajn fakterminarojn. Do ili nun certe ne nur enmetis la samajn terminojn en PIV sed ili enŝovis en ĝin ankaŭ plurajn novajn esprimojn kiujn ili deziris en la novan eldonon de la fakterminaro enmeti.

Grava atentigo por niaj legantoj estu ke ili nun havas fidindan konsultilon se ili verkas iun sciencajn artikolon eĉ traktajon. Vere nur en specialaj kazoj oni ne trovos en PIV la serĉitaĵon.

Se ni parolas pri la kvalita salto de PV al PIV ni nepre devas menci la grandan energion kaj fortostreĉon kiujn foruzis Prof. G. Waringhien dum pluraj dekoj da jaroj por ankoraŭfoje tralegi verkojn de Zamenhof kun celo trovi taŭgajn ekzemplojn por opaj vortoj, derivaĵoj kaj kunmetitaj vortoj. Se oni nur supraĵe legas PIV oni povas vidi ĉe opaj vortoj multajn tre bonajn ekzemplojn prenitajn de Zamenhof. Per tio la vortoj estas tiom bone klarigitaj ke oni tute ne povas miskompreni la sencon. Speciale ĉe nuancoj tio estas aparte grava, ĉar aliel ili ne estos komprenataj.

Ni ne diru nur laŭdajn vortojn pri PIV. En ĝi ekzistas ankaŭ preseraroj kio certe ne povas esti evitata ĉe tiom ampleksa verko. Krome, bedaŭrinde, la bildoj ne estas en la teksto de la vortaro sed ekster ĝi, ĉe la fino de la vortaro kiel bildtabuloj. Nome kiam oni parolis pri PIV antaŭ ĝia apero ĉiuj esperantistoj kredis ke ĝi estos samaspekta kiel la franca »Le petit Larousse« t.e. la bildoj devis esti en la teksto apud la koncernaj vortoj. Sed, je nia granda bedaŭro, kiam ni estis ricevintaj PIV ni vidis ke la bildoj estas apartigitaj de la ĉefa teksto de la vortaro. Sur la apuda paĝo ĉe ĉiu bildtabulo ekzistas priskribo de opaj bildoj, sed se oni deziras pli detale scii pri kio temas oni devas la koncernan vorton serĉi en la vortaro mem por tie trovi la precizan signifon kaj priskribon.

Pri kelkaj eraretoj kiuj estas jam plurfoje vaste pridiskutitaj en diversaj artikoloj kaj tamen restis en PIV kiel antaŭe (ekzemple duon — prefikse uzata kun ekzemploj duonpatro, duonpatrino, duonfilo, duonfilino) ni ne parolu ĉar tiam ĉi tiu artikolo devus esti multe pli ampleksa, kaj tio ne kondukus al iu utila celo. Nome se iu interesiĝas pri tiuj aferoj bonvolu konsulti diversajn gramatikojn kaj prilingvajn artikolojn en gravaj gazetoj.

Por simpla uzonto ĉi tiu vortaro estos bonega kaj tre utila konsultilo